

# Esperanto 261

## aktuell

39. Jahr (2020) №3 (261)



Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



Somera Esperanto-Studado 2020: virtuale kaj tutmonde. Vizito al Maribor. La palaco Schloss Hof. Pri pensoj kaj alvoko. Nekrologo: Drago Smolić. Invito al GEA-klerigmoduloj. Transpona Kongreso nun en 2021. Bundesversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes jetzt am 24. Oktober 2020.

Das universelle Geld, der Spesmilo und der Stelo. Kostenloser Esperanto-Kurs KEK. „Regenbogenfahrt“ transŝovita al 2021. UK en Montrealo prokrastita al 2022. DEJ-Videochats online seit dem 14.04. jeden zweiten Dienstag. Aktuelle Vorstandsmitglieder erzählen aus ihrer Amtszeit. Kanto "Ruĝa lumo, verda lumo".



## Deutscher Esperanto-Bund e.V. Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B  
www.esperanto.de/deb (Netzpräsenz)

**Bankkonto** (por membrokotoj kaj donacoj) /

**Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge

und Spenden): HELADEFIERB,

Sparkasse Odenwaldkreis,

DE 3250 8519 5200 4011 4571.

Spenden und Mitgliedsbeiträge für den

D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

**Oficejo / Geschäftsstelle:**

**Esperanto-Laden**

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

Leitung: *Sibylle Bauer*

030 / 5106 2935, 0800 336 3636

Fax: 030 / 4193 5413

sibylle.bauer@esperanto.de

**Membropriizorgado / Mitgliederbetreuung**

DEB: 0800 - 3 36 36 36 - 21

DEJ: 0800 - 3 36 36 36 - 22

**Briefpost** senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

**Estraro GEA / Vorstand DEB**

**Netzpost** an / retmesaĝo al [gea.fe@esperanto.de](mailto:gea.fe@esperanto.de)

Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar per E-Post-Adresse in der Form

*vorname.name@esperanto.de*.

**Prezidanto / Vorsitzender**

*Ulrich Brandenburg*, Durchwahl: -5111

[gea.prezidanto@esperanto.de](mailto:gea.prezidanto@esperanto.de)

**Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender**

*Andreas Emmerich*, Durchwahl: -5112

**Trezoristo / Kassenwart**

*D-ro Matthias Hecking*, Durchwahl: -5113

**Sekretario / Schriftführer**

*Nils Brinkmann*, Durchwahl: -5125

**Landaj ligoj / Landesverbände**

*Wolfgang Bohr*, Durchwahl: -5114

**Administrado / Verwaltung**

*Barbara Brandenburg*

**Publika agado kaj pliklerigado /**

**Öffentlichkeitsarbeit und Weiterbildung**

*Oliver Walz*, Durchwahl: -5116

**Kongresoj kaj renkontiĝoj /**

**Kongresse und Treffen**

*Andreas Diemel*, Durchwahl: -5120

**Informteknologioj/Informationstechnologie**

*Franz Kruse*, Durchwahl: -5119

**Jugendvertreterin / GEJ-komisiito**

*Michaela Stegmaier*, Durchwahl: -5118

**Germana Esperanto-Junularo /**

**Deutsche Esperanto-Jugend**

*Michaela Stegmaier*, Durchwahl: -5211

[gej.prezidanto@esperanto.de](mailto:gej.prezidanto@esperanto.de)

**Komisiitoj / Beauftragte**

[esperanto.de/deb/beauftragte](mailto:esperanto.de/deb/beauftragte)

**Gazetaraj kaj publikaj aferoj**

**/Presse und Öffentlichkeitsarbeit**

*Louis von Wunsch-Rolshoven*,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112

[louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de](mailto:louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de)

**Komisiito por rondvojaĝoj/ Rundreisen**,

Durchwahl: -5123

*Uli Ender*, [uli.ender@esperanto.de](mailto:uli.ender@esperanto.de)

**Erasmus+**

*Marianne Maurer*, Durchwahl: -5126

[marianne.maurer@esperanto.de](mailto:marianne.maurer@esperanto.de)

**Informmaterialo/Informationsmaterial**

*Goar Engländer*, Durchwahl: -5127

[goar.englaender@esperanto.de](mailto:goar.englaender@esperanto.de)

**Medienecho**

*Hermann Kroppenberg*, Durchwahl: -5121

[medienecho@esperanto.de](mailto:medienecho@esperanto.de)

**Libroservo / Bücherdienst**

D-ro / Dr. *Wolfgang Schwanzer*,

Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, Durchwahl:

-5122, [buchversand@esperanto.de](mailto:buchversand@esperanto.de), [www.esperanto.de/buchversand](http://www.esperanto.de/buchversand)

**Komisiito Interreta Redaktado /**

**Beauftragter Internetredaktion**

*Thomas Bormann*, Durchwahl: -5117

[thomas.bormann@esperanto.de](mailto:thomas.bormann@esperanto.de)

**Pliaj adresoj / Weitere Adressen**

**Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /**

**Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)**

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412

[www.esperanto.de/gej](http://www.esperanto.de/gej) (Netzpräsenz)

**Interkultura Centro Herzberg (ICH) /**

**Bildungszentrum des D.E.B.**

Komisiitoj/Beauftragte: *Zsófia Kóródy*

(instruado), *Peter Zilvar* (klerigado kaj kulturo),

Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die

Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521) 1363,

Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),

[ich@esperanto.de](mailto:ich@esperanto.de), [www.esperanto.de/ich](http://www.esperanto.de/ich)

**Germana Esperanto-Instituto /**

**Deutsches Esperanto-Institut**

Prof. D-ro/Dr. *Martin Haase*, Lehrstuhl für

Romanische Sprachwissenschaft,

Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel),

-432 (Fax), [martin.haase@esperanto.de](mailto:martin.haase@esperanto.de),

[www.esperanto.de/dei](http://www.esperanto.de/dei)

**Germana Esperanto-Biblioteko /**

**Deutsche Esperanto-Bibliothek**

p/a. *Karl Heinz Schaeffer*, Schulstr. 17, 73432

Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)

[biblioteko@esperanto-aalen.de](mailto:biblioteko@esperanto-aalen.de)

[bibliothek-aalen@esperanto.de](mailto:bibliothek-aalen@esperanto.de)

[www.esperanto.de/bibliothek](http://www.esperanto.de/bibliothek)

**Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung**

*Andreas Emmerich*, [estraro@fame-stiftung.de](mailto:estraro@fame-stiftung.de)

(nur por FAME)

**Stiftung Mondo**

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,

030/6920 4846-1, [stiftungmondo@gmail.com](mailto:stiftungmondo@gmail.com),

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG,

BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

**Aŭstria Esperanto-Federacio /**

**Österreichischer Esperanto-Verband**

[aef@esperanto.at](mailto:aef@esperanto.at), [www.esperanto.at](http://www.esperanto.at)

**Aŭstria Esperanto-Junularo /**

**Österreichische Esperanto-Jugend**

Weissgerberlande 30-36/5/11, 1030 Wien,

[aef@esperanto.at](mailto:aef@esperanto.at), <http://aef.esperanto.at>

**Esperantomuzeo Vieno /**

**Esperantomuseum Wien**

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien,

+43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische

Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 25,

1015 Wien, [plansprachen@onb.ac.at](mailto:plansprachen@onb.ac.at), [www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm](http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm)

**UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundes-**

**beauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA**

**Germanio / Deutschland**

D-ro / Dr. *Wolfgang Schwanzer*, Adressen siehe

mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

**Aŭstrio / Österreich**

*Leopold Patek*, Martinstr. 104/38,

3400 Klosterneuburg, Poŝtel. +43/66473611289,

[aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at)

**Esperanto aktuel**

ISSN 0942-024 X

**Eldonisto / Herausgeber**

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,

der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

**Redaktista teamo / Redaktion:**

*Stano Marček* (Martin/Slovakio),

*Yashovardhan Singh*, Im Johannistal 23, 42119

Wuppertal. Durchwahl: -54

**Kunlaborantoj / feste Beiträger:**

*Hermann Kroppenberg* (Medienecho),

*Utho Maier* (Bibliothek), Peter Zilvar (ICH)

**Presejo / Druck**

Alfaprint, Martin, Slovakio

*Esperanto aktuel* kun *-kune*- havas ses

numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo

(vidu maldekstre supre) por 18 €

(de eksterlando: 24 €) jare.

*Esperanto aktuel* mit *-kune*- erscheint

sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der

Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 18 €

(Ausland: 24 €) jährlich; für ordentliche

Mitglieder im Beitrag enthalten.

**Anoncoj / Anzeigen:**

Skribu al / Schreiben Sie an: [deb@esperanto.de](mailto:deb@esperanto.de)

**Kontribuoj / Beiträge**

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato \*.doc

a.s.) al [ea@esperanto.de](mailto:ea@esperanto.de), por n-ro 2020/4 ĝis

la 15-a de julio 2020. Paperaj kontribuoj nur

esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu

supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im

Format \*.doc o.ä.) an [ea@esperanto.de](mailto:ea@esperanto.de),

für Nr. 2020/4 bis zum 15. Juli 2020.

Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann

an Yashovardhan (s.o.).



## Karaj legantoj,

la krizo kaŭzita de la koronaviruso, la drastaj limigoj enkondukitaj por malhelpi ĝian disvastigon kaj la malcerteco pri ilia daŭro trafas ankaŭ la Esperanto-movadon. Antaŭ kelkaj semajnoj UEA anoncis la prokraston de la ĉijara Universala Kongreso, en kiu multaj el ni planis partopreni. Ni en GEA kune kun la polaj kaj fervoijistaj kolegoj longe atendis, sed finfine ankaŭ estis devigataj nuligi la planitan komunan kongreson en Frankfurt (Oder) kaj Slubice. La decido estis neevitebla: grandaj kunvenoj restas malpermesitaj, kaj dum mi skribas ĉi tiun leteron meze de majo la pola-germana limo restas fermita por turistoj. La ponton - simbolon de nia kongreso - por kongresanoj ne eblus transpasi. Iom simile al UEA ni tamen decidis ne simple nuligi la kongreson kaj perdi la investitan laboron. Ni prokrastas ĝin je unu jaro al la pentekostaj tagoj de 2021, kiam espereble la kondiĉoj denove estos pli bonaj. La ĝisnunaj aliĝoj daŭre validas, temo kaj programo restos esence la samaj. Detalojn vi trovos en la tria informilo, represita aliloke en ĉi tiu numero.

La prokrasto de la kongreso havas konsekvencojn por la interna funkciado de la organizantaj asocioj. GEA laŭ sia statuto devas kunvoki federacian asembleon (Bundesversammlung) unu fojon jare. Kunvokita ĝi estis bonorde, sed la senco de la statuto estas ke ĝi efektive okazu. La GEA-estraro tial decidis por la ĉijara asembleo nun uzi la jam interkonsentitan daton de la asocia konsilantaro (Verbandsrat). Ĝi do okazos - se ĝis tiam denove eblos - sabaton, la 24-an de oktobro en Herzberg. Nova invito kaj (senŝanĝa) tagordo aperas en ĉi tiu eldono de Esperanto aktuel kun la jarraporto por 2019. Ne estos kongreso kun ĉiuj kutimaj programoj, sed kunvenos tie ankaŭ la asocia konsilantaro kiel antaŭvidite, kaj kune kun la surlokaj geamikoj ni jam planas iom da programo ĉirkaŭ tiuj kunvenoj. Kiu ne jam konas ĝin, havos la ŝancon konatiĝi kun la „Esperanto-urbo“ kaj ĝiaj vidindaĵoj.

La viruso evidente influas ankaŭ aliajn aspektojn de la asocia laboro. Mi jam lastfoje skribis ke ni devis nuligi la antaŭpaskan renkontiĝon PSI en Wittenberg, por kiu GEA jam estis paginta 12.000 eŭrojn al la loka junulargastejo. Tiun monon la asocio feliĉe antaŭ kelkaj tagoj ricevis malgraŭ la seriozaj financaj malfacilaĵoj, en kiuj junulargastejoj hodiaŭ troviĝas (kaj kiuj endanĝerigas ilian pluekziston). La antaŭpagitajn kotizojn GEA repagis al la aliĝintoj. Ĉar por la kongreso en Frankfurt kaj Slubice ni ankoraŭ ne havis multajn elspezojn kaj povis redoni la rezervitajn kunvenejojn sen aldonaj kostoj, entute do niaj financaj perdoj pro la krizo ĝis nun ne estas altaj. Ni tamen rimarkos fine de la jaro ke mankos al ni grava kategorio de enspezoj: gajnoj el kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj en la lastaj jaroj konsiderinde helpis financi la ceteran laboron de la asocio. En 2019 kun la helpo de KOSMO GEA sukcesis eniri la KA1-programon de Erasmus+ kaj tiamaniere ricevi EU-subvenciojn. Tiu programo subvencias vojaĝ-kaj restadkostojn. Se oni ne rajtas vojaĝi, ne ekestas kostoj. Ĉar tiun problemon havas ne nur GEA, ni kalkulas ke eblos plilongigi la daŭron de la nuna subvenciperiodo en la venontan jaron kaj enmeti aliajn renkontiĝojn utilajn por la perfektigo de niaj aktivuloj.

Normala grupa vivo kun regulaj „fizikaj“ kunvenoj sub la nunaj kondiĉoj ne povas okazi. Pluraj el niaj grupoj intertempe sukcesis adaptiĝi al la situacio kaj fariĝi virtualaj. Iom peniga afero por tiuj, kiuj aŭ ne havas la necesan teknikon aŭ - male - jam estas devigataj pasigi sian tutan labortagon sidante antaŭ la ekrano kaj komunikante en virtuala mondo. Por mi persone virtualaj kunvenoj ne estas tre alloga alternativo, sed mi dankas al la grupoj pro la regulaj informoj pri iliaj spertoj. Tiuj spertoj povas esti interesaj: por Esperanto-grupo en la germana provinco ezeple ne estas ĉiutaga afero ke en kunveno partoprenas gastoj el Irano aŭ el afrikaj landoj.

Ankoraŭ unu kuraĝiga novaĵo: la krizo iamaniere helpas aktivigi volontulan laboron (vidu Esperanto aktuel 2/2020, paĝo 13: „Berlin sagt Danke“). Per la reto de volontulaj organizoj en Berlino ni konatiĝis kun Irina. Pro la krizo kaj reduktitaj laborhoroj ŝi nun havas iom pli da libertempo. Ŝi interesigas pri lingvoj, nun eklernas Esperanton kaj unu tagon semajne en la oficejo helpas katalogi librojn, kiujn ni pretigas por transdono al la Ŝtata Biblioteko. Bonvenon en Esperantujo!

Al vi mi deziras (malgraŭ ĉio) belan someron. Restu sanaj - vi estas daŭre bezonataj!

**Ulrich Brandenburg**  
Prezidanto de GEA

## Enhavtabelo/Inhalt

**1:** Somera Esperanto-Studado 2020: virtuale kaj tutmonde (legu sur la p. 32). Foto: Liba Gabalda

**2:** Adresoj

**3:** Germana Esperanto-Asocio: Karaj legantoj. Enhavo

**4-6:** Aŭstria Esperanto-Federacio: Vizito al Maribor la 10-an de marto 2020. La palaco Schloss Hof. RetRadio post naŭ jaroj. Cetere okazis...

**7-10:** Interkultura Centro Herzberg: Pripensoj kaj alvoko. Nekrologo: Drago Smolić. Koran inviton al GEA-klerigmoduloj. Iom pri niaj specialarkivoj kaj ejoj. Iom pri kelkaj specialaj kolektaĵoj. Germanglo. Krucenigmo

**11-16:** Germana Esperanto-Asocio: Transponta Kongreso (germana-pola-fervojista) nun en 2021! Tria informilo. Bundesversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes jetzt am 24. Oktober 2020. Deutscher Esperanto-Bund e.V. Tätigkeitsbericht 2019

**17:** El la fakaj ligoj: Das universelle Geld, der Spesmilo und der Stelo

**18-19:** El la amaskomunikiloj: Medienecho. Greziljono. Kostenloser Esperanto-Kurs KEK. „Regenbogenfahrt“ transŝovita al 2021. Esperanto-filmoj. UK en Montrealo prokrastita al 2022

**20:** Recenzo: Éric Vuillar: Tagordo. Rakonto

**21-22:** Publika agado: Die sprachliche Fünf-Klassen-Gesellschaft des Englischen

**23-24:** El bibliotekoj kaj arkivoj: Folge 53 – Jahresbericht 2019 für die Deutsche Esperanto-Bibliothek Aalen. Folge 54 – Lesefest, festo de legado!

**25-30:** ~~kune~~ – revueto de Germana Esperanto-Junularo: DEJ-Videochats online seit dem 14.04. jeden zweiten Dienstag. Aktuelle Vorstandsmitglieder erzählen aus ihrer Amtszeit. Ruĝa lumo, verda lumo

**31:** Literaturo: La Guliveriado

**32:** Somera Esperanto-Studado 2020: virtuale kaj tutmonde. SEP 2020 – ankaŭ nur virtuale

## Vizito al Maribor la 10-an de marto 2020

Kiel membroj de la Esperanto-klubo Graz, Ewald Schick kaj Karl Reinisch vizitis la fervojistan E-klubon Maribor, okaze de la ĝenerala kunveno, sub prezido de Karl Kovač. La komunan tagmanĝon oni ĝuis en bona landa „Gastejo je Tilio“ (Pri Lipi) <https://www.malcajt.com/podravska/maribor/gostilna-pri-lipi-tasner.html>

**P**ost bonega manĝado la gastoj kunveturis per ŝnurgondolo sur la montaro Pohorje, germanlingve Bachergebirge ([https://eo.wikipedia.org/wiki/Pohorje\\_montaro](https://eo.wikipedia.org/wiki/Pohorje_montaro)).

Tie oni marŝis tra neĝo al turo por ĝui panoramon – rigardo al neĝa Koralpo, Graz, al direkto de Hungario kaj Kroatio... Finfine la du Graz-anoj rondiris tra urbocentro, gustumante bonajn dolĉaĵojn en romantika sukeraĵejo. Hejmenveturante oni ankoraŭ ne sciis, ke tio estis la lasta ebleco por monatoj viziti eksterlandon. Ĉar en Aŭstrio baldaŭ poste venis la limigoj pro koronaviruso, kiuj malebligis pliajn vojaĝojn.

Karlo Reinisch kaj Karl Kovač ĉe monta stacio de ŝnurgondolo sur Pohorje (2020-05-15, Karlo Reinisch)



## La palaco Schloss Hof



Nur 30 km oriente de Vieno troviĝas la palaco Schloss Hof. Ĝi situas en Aŭstrio, tre proksime ĉe la landlimo kun Slovakio. Turistoj ŝatas la areon, ĉar ĝi konatigas kun arkitekturo, historio kaj botaniko. La regiono estas konata pro siaj cikonioj kaj pro tio, ke eĉ la maloftaj zizeloj troviĝas tie.



### Historio

La areo estas bela kaj okupas 50 hektarojn. La palaco situas sur eta monteto kaj donas bonan superrigardon al la ĉirkaŭo, inter alie ĝis Bratislavo. Ĝi plaĉis jam al Princo Eŭgeno de Savojo ([https://eo.wikipedia.org/wiki/Eŭgeno\\_de\\_Savojo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Eŭgeno_de_Savojo)).

Princo Eŭgeno estis fama aŭstra batalestro, kiu helpis defendi Vienon kontraŭ la turkoj. Li estis ne nur sukcesa militisto, sed ankaŭ riĉulo. En la jaro 1725 li aĉetis la palacon kaj multon plibeligis. Post la morto de Princo Eŭgeno en la jaro 1736 la palaco parttempe iĝis posedaĵo de



la imperiestrino Maria Theresia. Poste la konstruaĵoj estis dum longa tempo uzataj de armeoj. Ekde la jaro 2004 okazis sentebla renovigo, kiu revivigis la aspekton de la kastelo kaj de la ĝardeno, kiel ĝi estis dum la 18-a jarcento.

### Regulaj aranĝoj

La palaco estas alirebla dum la tuta jaro, kontraŭ enirpago. La granda areo entenas bele aranĝitajn ĝardenojn, simile al Schönbrunn aŭ Belvedere en Vieno. Sur la herbejoj paŝtas sin diversaj ĉeval-rasoj, kameloj kaj la plej lastaj blankaj azenoj.





Han YuLing kaj Alfred Heiligenbrunner ĉe Schloss Hof (2018)

([https://de.wikipedia.org/wiki/österreich-ungarischer\\_weißer\\_Esel](https://de.wikipedia.org/wiki/österreich-ungarischer_weißer_Esel))

Infanoj rajtas karesi kapojn kaj kokojn. Depende de la sezono okazas diversaj aranĝoj: kristnask-bazaroj, barokaj baloj, paskaj bazaroj, kajto-festo por infanoj. Ene de la areo troviĝas magazenoj, muzeoj kaj gastejo. La ĝardenoj plenas de kreskaĵoj kun manĝeblaj fruktoj. En kelkaj lokoj la vizitantoj rajtas pluki kaj manĝi la maturajn ĉerizojn, pomojn, legomojn, herbojn kaj berojn.

## Ponto al Slovakio

Proksime de Schloss Hof situas mallarĝa ponto, tra kiu eblas atingi Slovakion piedirante aŭ biciklante. La ponto superiras la riveron March, kiu tie estas limo inter Aŭstrio kaj Slovakio. Aŭtomobiloj ne rajtas uzi la ponton. Dum sunaj tagoj amaso da promenantoj ĝuas la ponton, kune kun biciklantoj.

## Proksimaj kasteloj

Proksime troviĝas aliaj vidindaj kasteloj: Schloss Niederweiden (5 km for) kaj Schloss Marchegg (9 km distanco al Schloss Hof).

## Spertoj

Jen raporto de esperantistino pri Schloss Hof: Gastante en Aŭstrio mi kelkfoje vizitis la bienon Schloss Hof. Tamen volonte tien mi revenus denove. Kial? La kialo simplas: la bieno ravas ne nur per bela ĉirkaŭaĵo, riĉa historio, sed ankaŭ per tio, ke ĝiajn riĉaĵojn eblas ne nur rigardi, sed ankaŭ tuŝi, elprovi, observi... Ĉiu trovas ion por fari: artaj-kaj histori-emuloj povas viziti ekspoziciojn en palaco, naturŝatantoj povas ĝui promenojn en belegaj florgardenoj, parko, bestoamikoj trovos diversajn bestojn, ne nur farmajn, sed ankaŭ ekzotikajn, por infanoj plenas distraĵoj, ludlokoj. Eblas manĝi en restoracio, aŭ simple pikniki sur herbejo kaj tiel pasigi tutan tagon en la bieno. Mi ĝuis, ke la palacbienon ŝatas viziti familioj, kaj post unu tago tie mi komprenis, ke tio estas bonega loko por pasigi tempon interese kaj bone ripozi. –Venu! (V.K.)

Schloss Hof, oficiala retpaĝo: <https://www.schlosshof>.

# RetRadio post naŭ jaroj

Almenaŭ unufoje en jaro indas konsideri la efikon de la laboro en la Esperanta Retradio. Tion mi ĝis nun faris ĉiufoje post unu plua jaro.

La 29-an de februaro finiĝis la naŭa jaro de la ĉiutaga apero de sonartikoloj en ERR kaj do estas okazo por okupiĝi pri la rezultoj de la laboro. La unua konstato estas, ke la nombro de geaŭskultantoj nur malforte kreskas. Dum la pasinta monato estis ĉirkaŭ 29.000 paĝelvokoj, do iom malpli ol 1000 ĉiutage. Aliflanke en la laŭlanda statistiko okazis signifa ŝanĝo, ĉar nun Rusio okupas la trian aŭ kvaran lokon post Usono kaj Brazilo. Ankaŭ la nombro de paĝelvokoj el Suda Koreio signife kreskis. Do plifortiĝis la ekstereŭropa aŭskultado, dum la centra lando de Eŭropo, nome Germanio, estas tiurilate daŭre malforta. Kaj tio estas komprenebla fenomeno, se oni konas la situacion de Esperanto en Germanio. En Germanio la intereso pri fremdaj lingvoj neniam estis tre granda, ĉar la lando troviĝas en la centro de Eŭropo kaj oni tie parolas la laŭnombro plej fortan eŭropan lingvon. Kaj depost la dua mondmilito la angla fariĝis pli kaj pli integra parto en la lingvokonscio de la germanoj. La angla lingvo ja estas principe ankaŭ ĝermana lingvo, kaj tial ĝi estas sufiĉe proksima al la germana. Kaj multaj malriĉaj germanoj dum la 19-a jarcento elmigris al Usono, kie ili fariĝis prospera populgrupo. Do la emo de germanoj lerni kaj paroli la anglan lingvon estas sufiĉe forta. Por Esperanto tial ne restas multe da spaco. Por plej multaj germanoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto, la lingvo mem estas nur ilo por partopreni en internacia komunumo, do por povi partopreni en Esperanto-aranĝoj. Kaj pro la centra situo de Germanio en Eŭropo multaj tiaj aranĝoj okazas ankaŭ en

esperanta retradio			
<a href="http://aldone.de/retradio">http://aldone.de/retradio</a>			
Propraj produktaĵoj de la Esperanta Retradio			
Programado kun muzika interludo	Atenon: La novaj sonartikoloj estas elvokibla ekde la 8:00 MEST (6:00 UTC) de la koncerna tago. Atenon la tagon!		
	Vidu la programiston kun bildoj ĉe <a href="#">Blogspot</a> .		
		Majo 2020	
		27-05-2020	04:26 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Paŭlo S. Viana: Nepre necesaj nestoj	26-05-2020	08:22 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Herbert A. Welker: La brazila insularo San Petro kaj San Paŭlo	25-05-2020	04:33 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Anton Obendorfer: Gepatroj atentu infanojn	24-05-2020	03:51 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Sonia Riso: Vitrinoj en muziko (8)	23-05-2020	04:29 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Anton Obendorfer: Trinkobeloj el sukero	22-05-2020	04:54 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Jaroslava Malá: Dankemo akcelas feliĝon	21-05-2020	04:47 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Anton Obendorfer: Promeni feliĝas	20-05-2020	04:16 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Paŭlo S. Viana: 200-jara Florence	19-05-2020	06:56 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Herbert A. Welker: Privata helpe por malriĉa afrika vilaĝo	18-05-2020	06:23 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Anton Obendorfer: Separita ejo por la hejma oficejo	17-05-2020	07:21 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Sonia Riso: Vitrinoj en muziko (7)	16-05-2020	04:31 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Anton Obendorfer: Kiel Vieno protektas sin kontraŭ varmego	15-05-2020	10:09 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Jaroslava Malá: Pli da feliĉo sen sociaj retaj	14-05-2020	04:36 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Anton Obendorfer: Praĉeltarapi kontraŭ Aldoso	13-05-2020	05:56 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Paŭlo S. Viana: Legi librojn dum la pandemio	12-05-2020	05:12 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Herbert A. Welker: Reĉiklado de ujoj por pesticidoj	11-05-2020	05:44 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Anton Obendorfer: Supertrakaj linioj kaj baterioj por aŭtobusoj	10-05-2020	05:15 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Andrzej Bach: Ricevinte donacon ne ĉagreniĝu	09-05-2020	06:48 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Sonia Riso: Vitrinoj en muziko (6)	08-05-2020	04:40 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Jaroslava Malá: La Unuaj majoj	07-05-2020	07:18 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Anton Obendorfer: Konsumo de ĵutubo kaj televido ĉe infanoj	06-05-2020	04:58 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Paŭlo S. Viana: La viruso ne parolas Esperanton	05-05-2020	05:16 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Herbert A. Welker: Kelkaj informoj pri la brazilaj indianoj (3)	04-05-2020	05:04 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Anton Obendorfer: Revolucio de manĝokulturo en Ĉinio	03-05-2020	06:30 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Andrzej Bach: Por ne tro timi kaj pli vivi	02-05-2020	06:30 <a href="#">Aŭskultu</a>
	Sonia Riso: Vitrinoj en muziko (5)		

Germanio, kaj tiel sufiĉe multaj germanoj tie povas partopreni. Tio signifas, ke ili bone povas kontentigi sian deziron pri internaciaj kontaktoj, ĉu en la lando mem, ĉu en najbaraj landoj, aŭ eĉ en aliaj kontinentoj, ĉar ili disponas pri la necesaj financaj rimedoj. La aŭskultado de retradio ne estas bezonata kaj ne prezentas iun dezirindan valoron por tiuj homoj. Simila estas la situacio en Britio, Skandinavio kaj Nederlando. En landoj kun latinidaj lingvoj (Francio, Brazilo, Italio, Hispanio ktp.) la intereso pri retradio en Esperanto estas pli granda. Oni tie ne sentas lingvan proksimecon al la angla, kaj oni bezonas la aŭskultadon de radio, por resti en kontakto kun la lingvo Esperanto. Tio parte validas ankaŭ por la orienteŭropaj landoj kaj por Rusio. Kaj fine estas Usono, kiu daŭre okupas la unuan rangon en la statistiko de paĝelvokoj. Por usonanoj Esperanto estas okazo okupiĝi entute pri fremda lingvo, kiu estas eĉ sufiĉe facile lernebla. Centmiloj da usonanoj jam eklernis Esperanton per Duolingo, sed tio bedaŭrinde ĝis nun ne estas rimarkebla en la statistiko de ERR. La laboro en la RetRadio prezentas al la kunlaborantoj grandan kontentigon. Esperanto estas mirinda lingvo kaj paroli ĝin al aŭskultantoj en la tuta mondo estas granda travivaĵo. Ni troviĝas nun en la deka jaro de nia komuna laboro. Ni restos fidelaj al nia sindediĉo (<http://aldone.de/retradio>).

(2020-05-13, Anton Oberndorfer)

## Cetere okazis...

### 2020-04-05: Kunsido de Esperanta Poŝtkruciĝo

Esperanta Poŝtkruciĝo estas interŝanĝo de poŝtkartoj inter esperantistoj el diversaj landoj aŭ regionoj. La kunsido okazis pere de ZOOM. Gvidis ĝin Irina Mirina Goncharova el Ruslando, la organizantino de la projekto. Partoprenis iom malpli ol dek personoj kaj ili babilis kaj interŝanĝis siajn spertojn (<https://www.facebook.com/groups/1421463748076350/> Esperanto poŝtkruciĝo).



### 2020-05-02: Kunsido de Ekparolu

Celo de la projekto Ekparolu estas, doni eblon al la ĵuslernintoj de Esperanto parole apliki la lingvon, ensociiĝi kaj informi ilin pri la programoj, kursoj kaj pluaj ebloj de studoj. Spertaj esperantistoj („geonkloj“) helpas al novuloj („genevoj“). Pere de ZOOM ĉirkaŭ 20 Esperantistoj interbabilis pri siaj spertoj kiel „geonkloj“ en la projekto Ekparolu. Katalin Kovats, kiu fondis la projekton, prezentis statistikojn pri enketoj, pri la pasintjaraj agadoj kaj ties evoluo. Sekva ZOOM-kunsido de „geonkloj“ okazis 2020-05-09, dum kiu „geonkloj“ lernis utiligi instrumentilojn de ZOOM por organizado de prelegoj kaj lecionoj. La kunvenon 2020-05-10 partoprenis ne nur „geonkloj“, sed ankaŭ „genevoj“. Okazis kelkaj prelegoj kaj lecionoj en tuta grupo kaj apartaj grupetoj („ĉambroj“).

<https://edukado.net/ekparolu>

### 2020-05-06: Kunsido de la packomitato Vieno

*(NGO Committee on Peace United Nations Vienna, COPV)*

Celoj de la organizo estas tutmonda malpliigo de armiloj kaj tutmonda edukado al paco por infanoj kaj plenkreskuloj. Okazis la kunsido komence de Majo, por elekti novan estraron de la packomitato. Pro la koronvira pandemio ĝi okazis virtuale per ZOOM. Partoprenis 13 homoj el 12 organizoj. Estis kaj restis prezidantino s-ino Helga Kerschbaum. Jam ekde du jaroj ŝi estas prezidantino. Ŝi emfazas, ke necesas pli da atentigo al edukado por paco, jam en lernejoj. Krome certe ankaŭ gravas kontrolo de atomrilataj armiloj kaj de la firmaoj, kiuj produktas aŭ investas en tiuj. Kiel sekretario estis elektita Christian Pavlovsky. Kiel reprezentantoj de UEA partoprenis s-ro Hans Michael Maitzen kaj Alfred Heiligenbrunner. Heiligenbrunner estis proponita kaj akceptita kiel vic-sekretario de COPV.

(2020-05-14, Alfred Heiligenbrunner)





# Pripensoj kaj alvoko

**Bonvolu permesi, ke mi kuraĝe diru mian opinion pri kelkaj Esperanto-situacioj, ĉar antaŭnelonge mi kompletigis mian 7-an jardekon.**

**M**i ĝojas, ke mi povis servi kaj helpi por Esperanto dum almenaŭ kvin jardekoj. Se la fortoj sufiĉos, volonte mi provas daŭrigi la multajn agadojn. Aparte mi fieras, ke ni realigis (kompreneble kune kun la Esperanto-Centro kaj GEA) la modeldonan fenomenon „Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo“. Vaste en la tiel nomata „Esperanto-mondo“ ĝi estas jam konata. Aparte mi devas elkore danki al nia EGS-estraro kaj al la senlaca Zsobia Korody, alimaniere tio ne estus atingebla. Al nia EGS-estraro momente apartenas la geestranaroj Harald Mantz, Zsobia Korody, Ursula Zilvar, Marika Frense, Matthias Reimann kaj Michaela Stegmaier. Same mi dankas al la membroj de EGS (Esperanto-Societo Sudharco) kaj de Germana Esperanto-Asocio. Foj-foje estis sponsoroj, ankaŭ al kiuj mi tre volonte dankas. Foje estis helpantoj, kiuj same meritas dankojn.

Grandan dankon ni ŝuldas al la urbo Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo (administracio, membroj de la urbaj konsilioj, urbestroj kaj vicurbestroj). Ni nun havas multajn parolpartnerojn en la loka kaj regiona administracio kaj politiko. Ekzemple la Esperanto-urbo disponigis al ni (por Esperanto) kvar konstantajn ejojn: Esperanto-ĉambron en la muzeo de la Welf-kastelo (ĝis nun okazis 15 fakaj ekspozicioj tie), Esperanto-angulon en la urba biblioteko kaj la du arkivejojn en la Malnova Urbodomo kaj en la iama baza lernejo en Herzberg-Siebert.

Al tre multaj homoj plaĉas la Esperanto-filozofio, i.a. pro tio, ĉar la britoj forlasis Eŭropan Union (kie restas la solidareco?)



kaj la lastjaraj politikaj laboroj el la tiel nomata libera Usono frontas kontraŭ niaj demokratiaj pensmanieroj.

Multaj nuntempaj esperantlingvanoj pensas, ke tute sufiĉas, se oni povas balbili kaj trovas tiel nomatajn Esperanto-amikojn. Aliflanke multaj atendas, ke iuj „aŭtomatoj“ faru la konstantajn laborojn.

Ekzemple nia vere eta teamo de la Esperanto-Centro rimarkas, ke oni bezonas multajn konstantajn aktivajn fakulojn por la multaj taskoj, ekz. arkivaj kaj bibliotekaj laboroj, junulara laboro, instruado, Esperanto-klubo, Esperanto-kursoj, ĝemelurba laboro, gazetara laboro, varbado kaj publika informado (PR), klerigmoduloj, novaj internaciaj projektoj, fakaj laboroj, konstanta interagado kun la Esperanto-urbo, aktualigoj de la hejmpaĝoj, varbado per Esperanto-aŭto en la vasta regiono, interparoloj kun aliaj (publikaj) organizaj grupoj kaj kulturasocioj, Esperanto-kulturo ktp. La listo de la konstantaj farendadoj eĉ pli longas. La Esperanto-movado nur povas atingi tion per konstantaj laboradoj. Tiam estos multaj realaj bonŝancoj.

Nepre ni devas elkonstrui Germanan Esperanto-Centron kun GEA-Filio por Klerigado en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, kiel unikan kompetenc-centron kun multaj honoroficaj kompetentaj fakuloj. Tiam ni povos fari grandan paŝon antaŭen. Ni bezonas fakulojn por instruado, varbado, arkivoj, bibliotekoj, financado, publikaj agadoj ktp.

Se vi volas helpi por kelkaj semajnoj, aŭ se vi eĉ volas konstante vivi en Esperanto-komunumo kun loĝejoj en la urbo, tiam vi estas bonvena.

Dum la tuta jaro io okazas. Enuo certe ne estos. Eble petu kelksemajnan provstaĝadon. Ni ja ankaŭ kuraĝis kaj laboradis. Havu kuraĝon!

Bonvolu kontakti nin. Ni parolos kun nia EGS-estraro. Dankon. Kore kaj samideane salutas via

**Petro Zilvar**



# Nekrologo: Drago Smolić

**Ni ricevis malgajan informon de la filino Maya Gilmbay, ke la 10-an de aprilo 2020 mortis la elkora kaj senpaŭze aktiva esperantisto Drago Smolić el Paderborn.**

**E**n la jaro 1971 li forlasis Kroation kaj translokiĝis al Paderborn, por senlace helpadi al Hermann Behrmann (Esperanto-Centro Paderborn) kaj poste al AIS – Akademio Internacia de la Sciencoj (sub gvido de profesoro Frank). Konstante li disvastigadis Esperanton, li fotadis, filmis en multaj Esperanto-eventoj, kongresoj ktp. Li ja havis la kromnomon "Filmović". Drago organizis kaj entuziasme varbis (laŭ propraj manieroj) por la internacia lingvo Esperanto. Ĉiam li estis bonhumora.

Drago Smolić naskiĝis la 22-an de februaro 1932 en Knin, en Dalmatio. Ofte li translokiĝis ene de Kroatio. Post la gimnazio

kaj industria lernejo li frekventis teknikan lernejon. En 1953 li lernis Esperanton ĉe la fama Esperanto-fervojiŝto Stevan Stojnić. En Esperanto-klubo de Zagrebo li interkonatiĝis kun sia posta edzino Melita Dörr. Kune ili havis tri filinojn. Jam en 1967 okazis divorco. La eksedzino estis kuracistino kaj aktiva esperantistino. Ŝi elmigris kun la filinoj al Svedio.

En la lastaj kelkaj jaroj li venis sufiĉe ofte de Paderborn al Herzberg, por helpadi en nia biblioteko, ordigi gazetojn, broŝurojn kaj librojn. Li tre ĝojis, ke li povis praktike kontribui al la multflankaj agadoj, renkonti aliajn aktivulojn kaj esti inter geamikoj. Li ankaŭ tre ĝojis, ke ekestis danke al la Esperanto-Centro en Herzberg "Esperanto-urbo Herzberg"!

Ofte li skribis al ni, petadis varbilojn kaj kuraĝigis nin por niaj multaj konstantaj taskoj en Herzberg.

Dum la tuta vivo li estis sindonema batalanto je favoro de nia lingvo. Dankegon pro via fideleco kaj helpemo, kara Drago!

Kara Drago, ripozu en paco!

Ni ne forgesos vin!

Amike kaj samideane kondolencas  
je nomo de la Esperanto-movado  
Petro Zilvar kaj Zsafia Korody





# Koran inviton al GEA-klerigmoduloj

**Spite al Kovid 19, ni i.a. organizos la jam tradiciajn GEA-studmodulojn, kompreneble kun la bezonataj higienaj kondiĉoj kaj preskriboj.**

**L**a venonta GEA-studmodulo okazos de la 2-a ĝis la 4-a de oktobro 2020 ĉe la GEA-Filio en Herzberg am Harz. I.a. prelegos, resp. instruos Frank Lappe kaj d-ro Christoph Klawe pri Unua Helpo. Vi povos ricevi oficialan atestilon en Esperanto kaj la germana. Ni jam komencos la 2-an de oktobro je la 14-a horo. Kromaj fakaj prelegoj pri diversaj temoj venos de Zsafia Korody, d-ino Anina Stecay, Martin Ptasiniski kaj Peter Zilvar. Bonvolu baldaŭ aliĝi.

De la 11-a ĝis la 13-a de decembro ni havos denove GEA-Klerigsemajnfinojn, kaj havos memorfeston okaze de la naskiĝtago de Zamenhof kaj la Tago de Esperanto-Libro.

Kompreneble vi povos partopreni unuopajn klerigmodulojn. GEA kaj la Esperanto-movado bezonas kompetentajn Esperanto-fakulojn. Pro tio ni ofertas regulajn klerigmodulojn. Je la sukcesa fino vi povos akiri atestilojn, ekz. "GEA-kursestro", "GEA-instruisto". I.a. ni instruas gramatikon, interlingvistikon, didaktikon kaj metodikon, tradukadon, argumentadon kaj varbadon, pri minoritataj lingvoj, E-literaturon, E-kulturon, organizadon ktp. Vi povas proponi fakprelegon. Cetere en la Esperanto-Centro (Interkultura Centro Herzberg) i. a. troviĝas danke al Zsafia Korody speciala unika librokolektaĵo por lernado, instruado kaj klerigado. Vi povos viziti nin kaj studi surloke laŭ antaŭa interkonsento.

Baldaŭ ni eldonos novan flugfolion kun la datoj de la klerigsemajnfinoj en la jaro 2021. Bonvolu helpi ĉe varbado. La Esperanto-movado bezonas aktivajn kaj kompetentajn Esperanto-fakulojn. Bonvenon!

## Iom pri niaj specialarkivoj kaj ejoj

**Dum la lastaj jaroj kaj jardekoj kreskadis la diverstipaj ege variaj kaj diverstipaj Esperanto-materialoj.**

**Ĉ**efe ni ja kolektas librojn kaj gazetojn. En la publika urba biblioteko troviĝas proksimume trimil libroj. Dum la malfermtempoj oni povas viziti la bibliotekon, kiu troviĝas en la urbocentro, nur 150 metrojn for de la urbodomo. La ĉefa biblioteko troviĝas en la supra etaĝo de la Esperanto-Centro (ICH). Grandparte kaj la gazetaĵoj kaj la bibliotekaj materialoj jam estas listigitaj. Fojfoje ni prenas

materialojn por niaj fakaj ekspozicioj, kiujn ni organizas en la Esperanto-ĉambro en la Welf-kastelo.

En la unua etaĝo de ICH ekestis speciala „manbiblioteko“ kun librobretoj laŭ diversaj temoj. De tie ni povas rapide preni bezonatajn librojn ktp. Kompreneble laŭ tempa interkonsento volonte ni povos montri al vi la bibliotekon. Nia granda arkivejo por duoblaĵoj ktp. troviĝas en la subtegmentejo de la Malnova Urbodomo. Fojfoje ni havis volontulojn, kiuj helpis por la ordigado de diversaj gazettipoj laŭ eldonjaroj ktp. La plej multaj duoblaĵlibroj nun staras tie laŭ la alfabeto de la titoloj. Kroma arkivejo troviĝas en la subtera etaĝo en la domo de la iama bazlernejo en Herzberg-Siebert. Tie staras ekzemple stokoj de la gazeto IPR kaj la unika kolektaĵo de Esperanto-libroj en brajla skribo. LIBE-membroj planas denove ferii dum la venontaj someroj en tiu bela feriovilaĝo Siebert, por pruntepreni kaj legadi librojn. Cetere tuj apude troviĝas bela subĉiela naĝejo kaj sufiĉe granda promenparko kun minigolf-ludejo.

## Iom pri kelkaj specialaj kolektaĵoj

**Herzberg am Harz ja ne estus „la Esperanto-urbo“, se tie ne estus multaj unikaj servoj rilate al Esperanto.**

**N**i jam menciis la plej grandan kolektaĵon en brajlskribo. Krome ni havas la plej grandan kolektaĵon kun (historiaj) turismaj broŝuroj en Esperanto (en bone ordigita stato laŭ kontinentoj, landoj, urboj).

Same nia numismatika kolektaĵo (moneroj kaj medaloj) rilate al Esperanto supozeble estas la plej granda en la mondo. Krome ni havas abundajn filatelajn kolektaĵojn. Multtipaj pingloj, glumarkoj el pluraj landoj, historiaj bildkartoj kaj fotoj pri diversaj temoj konstante estas kolektataj. Eĉ malgrandaj kolektaĵoj, kiel ekslibrisoj (el libroj), afiŝoj, talsakoj, skribiloj, T-ĉemizoj, varbiloj ktp. estas kompletigendaj. Sufiĉe grandaj kolektaĵoj, kiel filmoj (vidbendoj, kompaktdiskoj ktp.), sonmedioj (diskoj, kompaktdiskoj, sonbendoj ktp.) devas esti flegataj kaj prizorgataj. Ni scias, ke tio estis longjaraj laboroj, sed ankoraŭ longa laborvojo staras antaŭ ni. Ni devos ĉion konstante ordigi, eble ordigi laŭ iuj normoj, povos multajn materialojn laŭ temoj enskani ktp. Por ĉio ni bezonas kompetentajn honoroficajn kunagantojn. Ni ja havas samtempe diverstipajn prizorgendajn laborkampojn, same en interlaboro kun kaj por GEA kaj por Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. Tio estas unika bonŝanco kaj granda defio kaj por ni kaj por GEA kaj por Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. Cetere dum la tuta jaro estas multaj ofertoj kaj servoj rilate al Esperanto ĉe ni atingeblaj. Se vi iel volas helpi por certa tempo aŭ por ĉiam – bv. kontakti nin. Ĉe ni ekzistas diversaj esperigaj resp. verdaj laborkampoj. Laŭ tempa interkonsento vi povos viziti nin kaj ni povos surloke informi vin. Vi povas kontakti nin telefone: 05521-5983 aŭ rete: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de) – Bonvenon!

# GERMANGLO

(Sprich: Dschörmänglou)

*In alter Zeit ging man adrett,  
zückt's Portemonnaie, kauft ein Billett,  
vergaß auch nicht den Parapluie,  
aß á la carte ein grand Menue.  
Man saß auf einem Kanapee  
und wohnte an der Waldchaussee.*

*Französisch sprach man ja so gern;  
denn dieses galt nur als modern.  
Wer wollt' schon ungebildet sein?  
Nur deutsch zu reden, war nicht fein.  
Das ist nun völlig anders heute,  
denn Englisch sprechen alle Leute.*

*Der Dancing-room, der Swimming-pool,  
das Hobby auch ist wonderful !  
Man mixt die Drinks, man ist kein Snob,  
man knuspert Toasts und kauft im Shop.  
Man trägt im Partner-Look Blue Jeans,  
kauft Singles sich mit Evergreens.*

*Man geht zu Party und Weekend,  
man managt mit dem Börsentrend,  
man macht sich fit mit Sprays und Creams,  
man fährt zum Job und workt in Teams.  
Man lauscht den Hits und Songs der Stars,  
man hockt mit Darlings in den Bars.  
Die Pipeline bringt das Oil herbei,  
es spielt die Band, der Sekt ist dry.  
Man bringt zum City-Wash den Blazer.  
Und in der Zeitung liest der Leser  
Vom Open-Air-Festival  
mit Rock und Beat am Weserwall.*

*So übernimmt man fremde Muster.  
Wann wird der Deutsche sprachbewusster?*

*Snackt Platt mit den, de dat versteht !  
Sprecht DEUTSCH zu Deutschen weit und breit !  
Warum im Ausland radebrechen ?  
Man sollte ESPERANTO sprechen !*

Günther Peek, Nienburg (ca. 1990)

# Krucenigmo

kun du kaŝitaj proverboj de Stano Marček

LA UNUA KAŜITA PRO- VERBO	SUBSTAN- TIVA FINAJO	AUTO- SIMBOLO DE DAN- LANDO	GRANDA ARBARA BEST'	PROFITO, BON- EFIKO	FADEN' IRANTA EL MJELO	LA DUA KAŜITA PRO- VERBO
INTER- PLEKTU ŜNUROJN				NUME- RALO HIDRO- KARBIDO		
ADVERBA FINAJO	STULT- EGUL' „MURJO“ DE KUBO					
TUTE PROK- SIME		DIREKTU AŬTON IDENTE, SIMILE				
VENINTA PENS, KONCEPT'			NOMO DE EDISON SPIRITA ATMOSFERO			
GRANDA MUZIKA INSTRU- MENTO					SIMB. DE FOSFORO KAPI- TALISTA	
ETA REM- SIPO				SIMB. DE BARIO TEA KAFEINO*		
KUIREJA AKRA- GUSTA BULBO				FINGRA ALMET' SPECIO DE KAMBIO		
TUNO	BONODORA KEMIA KOMBINAJO MANGEBLA KARN					
PRA- PATR'		FARIĜI ORKOLORA VERKAD', ESTIGAD'				
HINDA SEKTAN'			MEM- BRAR' PART DE HISTO			
ERODITA KALK- ROKO					NULO ERC- MINEJ	
FEMAL- ETO					INTERNE „INSULOJ“ EN DEZERTO	
LIRIKA POEMAR'				BELA IN- TERARANG' NEIDEN- TIFIKITAJ OBJEKTOI		
TARO (MAL- LONGIGO)	DONI, DEDIĈI RAPIDE MOVIGUS					
NUME- RALO		EGA MAL- RIĈEC' DIFINITAJ OKAZAJOJ				
MALANTUĈA PART DE LA KOLO			IAM, UNU- OKAZE MONATO			
TEATRAJ VERKOJ					SIMBOLO DE KALIO KOMENCI	
SAGACAJ, ARTI- FIKAJ					MAL- GRANDIGA SUFIKSO KONJUN- KCIO	
ALTAJ LUD- KARTOJ				VICMONTRA NUMERALO ROMANE 500		
SIMBOLO DE SULFURO	TIROL- KANTIS					



Transponta Esperanto-Kongreso  
germana - pola - fervojista



Frankfurt (O) / Słubice

21-a – 28-a de Majo 2021



FUNDACJA WSPÓŁPRACY  
POLSKO-NIEMIECKIEJ

STIFTUNG  
FÜR DEUTSCH-POLNISCHE  
ZUSAMMENARBEIT

# Transponta Kongreso (germana-pola-fervojista) nun en 2021!

## Nova dato: 21.-24.05. (28.05.) 2021 en Frankfurt (Oder) kaj Słubice

### Tria informilo

#### Viruso

Ne estos surprizo por vi, ke la koronaviruso devigas ankaŭ nin nove disponi. Kiel anoncite, ni atendis ĝis post la paskaj ferioj antaŭ decido pri nuligo de la kongreso. Montriĝis, ke multaj el la limigoj, enkondukitaj en Germanio, Pollando kaj aliaj landoj pro la viruso, daŭras kaj estas plilongigataj. En tiu situacio la organizantaj asocioj ne povas kun sufiĉa certeco garantii, ke eblos okazigi la kongreson. Alternativa dato ĉi-jare estus malfacile trovebla, krome riska. La Transponta Kongreso do ne okazos en 2020.

Pro la investita laboro (kaj ĉar ni daŭre pensas, ke dulanda kongreso kun partopreno de IFEF estas bona ideo), ni esploris pri la eblecoj prokrasti la eventon je unu jaro ĝis la pentekostaj tagoj 2021. La kunvenejoj ankaŭ tiam estos je dispono, kaj la Fonduso por Pola-Germana Kunlaboro indikis sian pretecon ŝovi la anoncitan subvencion por nia kongreso al 2021. La temo “najbaroj” povos resti la sama. Ni ĉiuj estos unu jaron pli aĝaj, sed la Transponta Kongreso okazos!

#### Aliĝoj

Por la kongreso GEA, PEA kaj IFEF ricevis entute 160 aliĝojn (la kutima "dua ondo" komence de la jaro ne venis, ĉar pro la viruso multaj jam hezitis). Ni interkonsentis trakti la ĝisnunajn aliĝojn jene:

1. Ĉiuj aliĝoj por la transponta kongreso 2020 estas konsiderataj kiel aliĝoj por 2021, kaj restas validaj.

La ricevataj kotizoj eniros la buĝeton por la Transponta Kongreso 2021.

2. Al ĉiuj, kiuj deziras, oni repagos la kotizon. Tio signifas malaliĝon. Sufiĉas sendi informon al: [gek@esperanto.de](mailto:gek@esperanto.de). Por novaj aliĝoj daŭre validas [gek.aligho@esperanto.de](mailto:gek.aligho@esperanto.de). La poŝta adreso estas: Germana Esperanto-Asocio, Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin, telefono +4930 5106 2935.
3. Ni tre dankas al ĉiuj, kiuj indikis sian pretecon kontribui al la programo. Ni kontaktos ilin aparte, sed ĉiukaze esperas, ke ilia preteco validas ankaŭ por la venonta jaro.
4. Enspezoj el kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj kutime estas gravaj monfontoj por niaj asocioj. Ili grandparte mankos en 2020. Des pli bonvenaj estas donacoj - ĉu por la kongresa kaso 2021, ĉu por la ĝeneralaj kasoj de la asocioj.

#### Jarĉefkunveno

#### (Federacia Kunveno) de GEA 2020

Germana Esperanto-Asocio planis organizi sian ĉi-jaran Federacian Kunvenon kiel kutime en la kadro de la kongreso. Invito kaj tagordo ĝustatempe aperis en la asocia revuo ("Esperanto aktuel" 2020/1, paĝo 6). Laŭ la statuto necesas havi Federacian Kunvenon unu fojon jare. La estraro decidis, ke en ĉi tiu jaro la kunveno okazu en la kadro de la jam longe planita Asocia Konsilantaro (kunveno de landaj ligoj) sabaton, la 24-an de oktobro en Herzberg (Harz). La tagordo restos la sama. Detaloj aperos en la venontaj eldonoj de la revuo.

## Einladung und TO Bundesversammlung 2020 - neu -

# Bundesversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes jetzt am 24. Oktober 2020

### Liebe Mitglieder,

die auf Grund der Corona-Krise verfügten Beschränkungen haben uns leider gezwungen, den für die Pfingsttage 2020 geplanten Kongress in Frankfurt (Oder) und Slubice um ein Jahr zu verschieben. In seinem Rahmen sollte die diesjährige Bundesversammlung des D.E.B. stattfinden (siehe *Esperanto* aktuell 2020/1, Seite 6). Para. 7.4 unserer Satzung sieht jedoch vor, dass die Bundesversammlung mindestens einmal jährlich einberufen wird. Der Vorstand hat daher beschlossen, für die Bundesversammlung 2020 den bereits vereinbarten Termin der Sitzung des Verbandsrats zu nutzen in der Hoffnung, dass eine Veranstaltung dieser Größenordnung im Oktober wieder möglich sein wird. Im Zusammenhang mit der Bundesversammlung wird auch die Möglichkeit bestehen, Angelegenheiten der Landesverbände und Fachorganisationen zu erörtern und sich mit der Esperanto-Stadt Herzberg vertraut zu machen.

Ort: Rittersaal im Welfenschloss, 37412 Herzberg (Harz)

Zeit: Samstag, den 24. Oktober 2020 ab 14:30 Uhr

### Vorgeschlagene Tagesordnung

1. Eröffnung
  - a) Begrüßung
  - b) Feststellung der Beschlussfähigkeit
  - c) Genehmigung der Tagesordnung
  - d) Wahl der Protokollführer und des Versammlungsleiters zu TOP 3 und 4 a)
  - e) Genehmigung des Protokolls der Bundesversammlung vom 9. Juni 2019 (siehe *Esperanto* aktuell 5/2019)
    1. Berichte der Bundesorgane
      - a) Bericht des Vorstandes (siehe Tätigkeitsbericht in *Esperanto* aktuell 3/2020)
      - b) Bericht des Schatzmeisters (siehe Jahresabschluss 2019 in *Esperanto* aktuell 2/2020)
      - c) Bericht der Rechnungsprüfer (siehe *Esperanto* aktuell 2/2020)
        1. Entlastung des Vorstandes
        2. Wahl eines von zwei Rechnungsprüfern
        3. Haushaltsplan 2021 (siehe *Esperanto* aktuell 1/2020)
        4. Behandlung von Anträgen

5. Ort und Zeit der Bundesversammlung 2021

6. Verschiedenes

Anträge zur Bundesversammlung bitte ich rechtzeitig bei mir einzureichen. Soweit sie die Satzung, Beiträge oder Auflösung des D.E.B. betreffen, müssen sie mir lt. Satzung 3 Monate vor der Bundesversammlung vorliegen und spätestens 4 Wochen vor der Versammlung zirkuliert werden.

Ich freue mich, Sie im Oktober in Herzberg begrüßen zu dürfen!

Berlin, den 11. Mai 2020

gez. Ulrich Brandenburg,  
Bundesvorsitzender

## Deutscher Esperanto-Bund e.V. Tätigkeitsbericht 2019

### 1. Einleitung

Ergänzend zu dem nachfolgenden Jahresbericht wird auf die regelmäßige Berichterstattung in der Verbandszeitschrift *Esperanto* aktuell verwiesen. Beiträge zu den Aktivitäten des Deutschen Esperanto-Bundes (D.E.B.), seines Jugendverbandes (Deutsche Esperanto-Jugend e.V.) sowie seiner Mitgliedsvereinigungen und -einrichtungen erschienen im Berichtsjahr in allen 6 Ausgaben der Zeitschrift.

### 2. Bundesversammlung 2019 in Neumünster

